WIKIPEDIA

Vilamovica lingvo

Vilamovica lingvo (vilamovice *Wymysiöeryś*) estas okcidentĝermana lingvo kiu estas parolata en la urbeto Wilamowice (Wymysoj vilamovice) apud Bielsko-Biała, sur la limo inter Silezio kaj Malgrandpolio en la historia regiono Galicio. Hodiaŭ vilamovica lingvo estas parolata de ĉirkaŭ 70 denaskaj parolantoj, ĉiuj maljunuloj; tial vilamovica lingvo estas endanĝera lingvo.

Vilamovica lingvo	
Wymysiöeryś	
Parolata en	Pollando
Parolantoj	70
Denaskaj parolantoj	>70
Fremdlingvo / dua lingvo por	ne
Skribo	latina
Lingvistika klasifiko	
Hindeŭropa	
Ĝermana	
Okcidentĝermana	
Wymysiöeryś	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	ne estas
Reguligita de	?
Lingva statuso	4 severe endanĝerigita
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	gem
ISO 639-3	wym
SIL	?
Glottolog	wymy1235
Angla nomo	Vilamovian
Franca nomo	wilamowicien

Enhavo

Historio

Vilamovica alfabeto

Ekzemploj kaj rilatoj kun aliaj lingvoj

Ekzemplaj tekstoj

Konsilitaj legaĵoj

Piednotoj

Eksteraj ligiloj

Historio

Origine, vilamovica lingvo ŝajnas derivi de mezaltgermana lingvo je 12-a jarcento, kun granda influo de platgermana lingvo, de nederlanda lingvo, de frisa lingvo, de pola lingvo kaj de anglosaksa lingvo. Oni pensas ke la loĝantoj de Wilamowice estas posteuloj de la germanaj, nederlandaj kaj skotaj koloniuloj kiuj alvenis al Pollando je 13-a jarcento. Ĉiukaze, la loĝantoj de Wilamowice ĉiam negis ian ajn ligon kun Germanio kaj ili ĉiam insiste asertis ke ili havas nederlandan originon.

Vilamovica lingvo estis dialekta lingvo de Wilamowice ĝis la jaroj 1939 – 1945. Post la Dua Mondmilito, la lokaj komunistaj aŭtoritatoj malpermesis la uzado je ĉi tiu lingvo. Kvankam la malpermeso ĉesis post la 1956 jaro, vilamovica lingvo estis laŭgrade anstataŭita de pola lingvo, ĉefe inter la junuloj.

Laŭ la propono de Tymoteusz Król, dekkvarjarulo en tiu tempo, la Biblioteko de Kongreso aldonis vilamovican lingvon al la registro de lingvoj la 18-an de julio 2007. La lingvo estis ankaŭ enregistrita ĉe la Internacia Organizaĵo por Normigado, kiu atribuis al ĝi la ISO kodon *wym*.[1]

Vilamovica lingvo estas la lingvo kiun la poeto Florian Biesik uzadis por skribi siaj poeziaĵoj dum la 19-a jarcento.

Vilamovica alfabeto

La vilamovica alfabeto, kreita de Józef Gara, konsistas el 34 literoj derivitaj el la latina alfabeto:

Majuskloj																																	
A	Ao	B	C	Ć	D	E	F	G	H	I	J	K	L	Ł	M	N	Ń	O	Ö	P	Q	R	S	Ś	T	U	Ü	V	W	Y	Z	Ź	Ż
Minuskloj																																	
a	ao	b	c	ć	d	e	f	g	h	i	j	k	l	ł	m	n	ń	o	ö	p	q	r	s	ś	t	u	ü	v	w	y	z	ź	ż

La ortografio de vilamovica lingvo inkludas la "AO" digrafo, kiu estas konsiderita aparta litero.

Ekzemploj kaj rilatoj kun aliaj lingvoj

Jen kelkaj ekzemploj de vilamovicaj vortoj kun germana, nederlanda kaj angla traduko. Vilamovice la litero **ł** sonas kiel esperanta **ŭ** kaj la litero **w** sonas kiel **v**:

Vilamovice	Germane	Nederlande	Angle	Esperante
ałan	allein	alleen	alone	sola
ana, an	und	en	and	kaj
bryk	Brücke	brug	bridge	ponto
duł	dumm	dom	stupid (komp. ang. dull)	malsaĝulo
fulgia	hören	horen	to hear (sed komp. ned. *volgen* kaj ger. *folgen* "sekvi", kiuj signifas ankaŭ "kompreni, aŭskulti", kaj ang. "follow?" = "ĉu vi komprenas?")	aŭskulti
ganc	ganz	gans	entirely	tuta, tute
gyrycht	Gericht	gerecht	court (komp. ger. *Recht* "rajto" kaj ang. *right*)	tribunalo
dyr hymuł	Himmel	hemel	heaven	ĉielo
łiwa	Liebe	liefde	love	amo
a mikieła	ein bisschen	een beetje	a bit (komp. ags. *micel* kaj ang. *much*)	iom
müter	Mutter	moeder	mother	patrino
mytuł	Mitte	middel	middle	centro, mezo
nimanda	niemand	niemand	no one (komp. ang. *no man*)	neniu
ny	nein	nee	no	ne
ödum	Atem	adem	breath (komp. ags. *æðm*, arkaika ger. *Odem*, okcidentcentra ger. *Öödem*)	spiro
olifant	Elefant	olifant	elephant	elefanto
öwyt	Abend	avond	evening	vespero
śrajwa	schreiben	schrijven	to write (komp. ang. *shrive*, aŭ la pli tarda prunto *scribe*)	skribi
syster	Schwester	zuster	sister	fratino
śtaen	Stein	steen	stone	ŝtono
trynkia	trinken	drinken	to drink	trinki
obrozła	Bild	beeld	picture (komp. pol. *obraz*)	bildo
wełt	Welt	wereld	world	mondo
wynter	Winter	winter	winter	vintro
zyłwer	Silber	zilver	silver	arĝento
zyjwa	sieben	zeven	seven	sep
sgiöekumt	wilkommen	welkom	welcome	bonvena

Ekzemplaj tekstoj

Patro Nia vilamovice:

Ynzer Foter, dü byst ym hymuł,
daj noma zuł zajn gywajt,
daj Kyngrajch zuł dö kuma,
daj wyła zuł zajn ym hymuł an uf der aot.
Dos ynzer gywynłichys brut gao yns haojt,
an fercaj yns ynzer siułda
wi wir aoj fercajn y ynzyn siułdigia,
ny łat yns cyn zynda,
zunder kaonst yns reta fum nistgüta.
[Do dajs ej z Kyngrajch, dy maocht an ans łaowa uf inda.]

Patro Nia, vi estas en la ĉielo,
sanktigata estu via nomo,
venu via Reĝeco,
estu volo via en la ĉielo kaj sur la tero.
Nian ĉiutagan panon donu al ni hodiaŭ,
kaj pardonu al ni ŝuldojn niajn
kiel ni pardonas al niaj ŝuldantoj,
ne konduku nin en tenton,
sed liberigu nin de la malbono.
[Ĉar viaj estas la Reĝeco, la forto kaj la gloro eterne.]

Vilamovica lulkanto kun traduko:

Śłöf maj büwła fest!
Skumma fremdy gest,
Skumma müma ana fetyn,
S'Brennia nysła ana epułn,
Słöf dy Jasiu fest!

Dormas mia knabeto profunde!
La fremdaj gegastoj estas alvenantaj,
La onklinoj kaj la onkloj estas alvenantaj,
Ili portas aveletojn kaj pomojn,
Dormas Jasiu profunde!

Mallonga teksto kun traduko:

Kum zie makja
Dü cy mir
Ych wył kuza
Abysła myt dir

Venu knabino
Vi al mi
Mi volas paroli
Iomete kun vi

Unua artikolo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj:

„ Oły łaojt zajn gybün yr frajchajt głajch myta aondyn łaojta. Dy zajn bysienkt mytum gydechnys an myt ar zejł an dy zuła zich myt aondyn bygejn wi bridyn. ”

„ Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencon, kaj devus konduti unu al alia en spirito de frateco. ”

Konsilitaj legaĵoj

- Ludwik Młynek, *"Narzecze wilamowickie"*, Tarnów. 1907: J.Pisz.
- Józef Latosiński, *"Monografia miasteczka Wilamowic"*, Kraków, 1909.
- Hermann Mojmir, *"Wörterbuch der deutschen Mundart von Wilamowice" (Słownik niemieckiej gwary Wilamowic)*, Kraków, 1930-1936: Polska Akademia Umiejętności.

- Adam Kleczkowski, *"Dialekt Wilamowic w zachodniej Galicji. Fonetyka i fleksja"*. Kraków, 1920: Polska Akademia Umiejętności.
- Adam Kleczkowski, *"Dialekt Wilamowic w zachodniej Galicji. Składnia"*, Poznań, 1921: Uniwersytet Poznański.
- Maria Katarzyna Lasatowicz, *"Die deutsche Mundart von Wilamowice zwischen 1920 und 1987"*. Opole, 1992: Wyższa Szkoła Pedagogiczna.
- Tomasz Wicherkiewicz, *The Making of a Language: The Case of the Idiom of Wilamowice*, Mouton de Gruyter, 2003, ISBN 3-11-017099-X

Piednotoj

1. ↑ http://www.sil.org/iso639-3/documentation.asp?id=wym SIL.org

Eksteraj ligiloj

- Wymysiöeryś – jeszcze mowa nie zginęła (https://www.youtube.com/watch?v=lfg3jHV1TzE) ĉe YouTube. Agencja Fotograficzna Fotorzepa.

Provejo en Vilamovica lingvo de Vikipedio ĉe Vikimedia Inkubejo

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Vilamovica_lingvo&oldid=5832844"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 10:41, 23 dec. 2015.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.